


LA JUNANA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

JARABONO :
NEDERLANDO :
0,80 GULDENO

ĜIRONUMERO
209354 NEDERL.

ALIAJ LANDOJ :
16 Fr. Fr.; 0,70 Dol.; 2,1 Sv. Fr.

F 117/39

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LA NAJTINGALO *

(Teatraĵeto en 2 aktoj, laŭ fabelo de Andersen)

(Prezentita en Tervuren)

Personoj :

Fabelvirineto	kuracisto	kuireja knabineto
Imperiestro	2 lakeoj	kelkaj figurantoj
3 korteganoj	horloĝisto	kuriero

Unua akto.

(La scenejkurtenoj estas fermitaj. Antaŭ ili staras la rakontanta fabelvirineto)

Virineto : Mi estas la fabelvirineto, kaj mi rakontos al vi ion, kio okazis antaŭ multe, multe da jaroj. Sed ĝuste tial vi bone aŭskultu la historion, ĉar alie oni povus ĝin forgesi...

Iam estis imperiestro. La palaco de tiu imperiestro estis la plej bela en la mondo. En la ĝardeno kreskis la plej rimarkindaj floroj, kaj de ili pendis arĝentaj sonoriletoj, tiel, ke oni ne povis preterpasi la florojn, ne rimarkante ilin. Kaj la ĝardeno estis tiel granda, ke eĉ la ĝardenisto ne sciis, kie estas ĝia fino. Kiam oni trairis la ĝardenon, oni venis en plej belegan arbaron kun altaj arboj kaj profundaj lagoj. La arbaro kundukis al la maro, kiu estis blua kaj profunda. Grandaj ŝipoj povis naĝi sub la superpendantaj branĉoj, kaj en tiuj lastaj loĝis najtingalo, kiu dolĉe kantis. Ĝi kantis tiel dolĉe, ke la malriĉa fiŝkaptisto, kiu nokte eliris por etendi sian reton, aŭdis ĝin, kaj ĉiam denove li devis aŭskulti la najtingalon! El ĉiuj landoj de la mondo venis vojaĝantoj al la urbo de la imperiestro kaj admiris ĝin kaj la palacon, kaj la ĝardenon. Sed kiam ili aŭdis la najtingalon, ili ĉiuj diris :

* (En ĉi teatraĵeto oni bezonas 2 lud-birdojn. Por la kantado de la najtingaloj oni povas uzi gramofondiskon. La blekadon de la bovino kaj ranoj oni povas imiti per ludiloj.)

„Tio ĉi estas tamen la plej bona!” La vojaĝantoj rakontis pri tio tuj post sia reveno. Kaj la scienculoj verkis librojn pri la urbo, la palaco, kaj pri la ĝardeno. Sed la najtingalon ili ne forgesis. Al ĝi ili dediĉis la ĉefan ĉapitron. Kaj tiuj, kiuj povis verki versojn, verkis la plej belajn poeziaĵon pri la najtingalo en la arbaro, apud la profunda maro... Oni tradukis la librojn en ĉiujn lingvojn, kaj kelkaj el ili atingis la imperiestron... **(post ŝi malfermiĝas la kurtenoj, kaj la virmeto foriras. La scenejo prezentas imperiestran ĉambregon. La imperiestro sidas sur trono kaj legas. Li aspektas kontente).**

Imperiestro (laŭtleĝas) : Oni ne povas imagi, kiom belega estas tiu ĝardeno! Sed la najtingalo tamen estas la plej bona el ĉio!” **(Ili mire rigardas antaŭ si).** Kion ĉi tio povas signifi? Najtingalo?? Ĝin mi ja tute ne konas. Ĉu ekzistas tia birdo en mia regno kaj en mia propra ĝardeno? Pri tio mi neniam aŭdis! Kaj pri io simila mi sciigis nur el la libroj?! **(turnas sin al la unua el la du lakeoj, kiuj staras ĉe la pordo)** : Iru por voki mian kortegestron kaj aliajn korteganojn.

Unua lakeo (al 2-a) : Lia Moŝto deziras, ke vi iru por voki la kortegestron kaj aliajn korteganojn. **(2-a lakeo for).**

Imp. (foliumante en la libroj) : Jes, oni multe laŭdas mian palacon kaj ĝardenon! Saĝa imperiestro mi estas. Sed pri tiu najtingalo mi neniam aŭdis. Mi nepre konu ĝin! **(envenas la 2-a lakeo kun la korteganoj. Oni riverencas antaŭ la imperiestro).**

Imp. : Diru al mi, sinjoroj korteganoj, ĉu vi konas la bestojn, kiuj loĝas en la imperiestra palaca kortego?

Kortegestro : Ho jes, via moŝto, en la imperiestra kortego oni povas admiri la belegajn ĉevalojn, kiuj havas la favoron porti vian moŝton.

2-a kortegano : Kaj la fidelajn hundojn, kiuj ŝirmas la kortegon, kaj kies plej granda plezuro estas akompani vian moŝton dum la ĉasado.

3-a kortegano : Krome ni konas la pavojn, kies belegaj plumoj ornamas la kortegon.

Imp. (malpacience) : Sufiĉas. Tiujn ankaŭ mi konas. Sed en ĉi tiuj libroj mi legis pri birdo, kiu tiel bele kantas, ke eĉ eksterlandaj reĝoj parolas pri ĝi. Oni nomas ĝin najtingalo, kaj ĝi vivas en la palaca ĝardeno.

Ĉiuj korteganoj (rigardante unu la alian) : Kiel strange, ke ni ne konas ĝin!

Kortegestro : Via moŝto pardonu min, sed via moŝto tute ne povas prezenti al si, kiom da mensogoj oni verkas en la libroj. Eble ĉio ĉi tio estas fantazioj kaj apartenas al la tiel nomata nigra magio!

Imp. : La libron, en kiu mi legis pri la najtingalo, sendis al mi lia moŝto la imperiestro de Japanujo. Sekve ĝi ne povas esti malveraĵo. **(severe)** : Tio estas neeltenebla. La tuta mondo skribas pri la bela birdo en mia ĝardeno, kaj mi ne konas ĝin! Do, diru al mi : Kiu el vi konas la najtingalon?

Ĉiuj : Mi ne konas, mi ne konas. Mi bedaŭras, via moŝto, mi ne konas ĝin!

Imp. (severe) : Mi volas aŭdi la najtingalon! Ĝi nepre estu hodiaŭvespere en mia palaco. Ĝi havas mian plej moŝtan favoron. Vi zorgu pri tio. Kaj se ĝi ne venos en mian palacon, tiam mi ordonos piedpremi la ventrojn de ĉiuj korteganoj, tuj post via vespermanĝo! **(ĉiuj vole ne vole frotas la ventron).** Vi ĉiuj estas surduloj, kiuj ne aŭdas kio okazas en la imperiestra ĝardeno. Hontu ! Vi estas malkleruloj !

- 2-a kortegano** : Via moŝto ne koleru. Mi scias, ke kuireja knabineto parolis pri la fama birdo!
- Imp.** : Tuj venigu tiun kuirejan knabineton.
- Imp. (malpacience)** : Neeble? Kial do?
- Kortegestro** : Al kuireja knabineto estas malpermesite, ke ŝi vidu la imperiestron sur la trono.
- Imp.** : Hodiaŭ tiu leĝo ne validas. Venigu la knabineton!
- Kortegestro (al 2-a lakeo)** : Iru por voki la kuirejan knabineton.
- Imp.** : Kaj vi promesu al la kuireja knabineto, ke ŝi rajtas vidi la imperiestron dum lia manĝado, se ŝi povas informi min pri la najtingalo. **(2-a lakeo revenas kun simple vestita knabineto).**
- Kortegestro** : Vi, kuireja knabineto, ĉu vi konas la najtingalon el la palaca ĝardeno? Tre felika vi estos, se vi konas tiun birdon, ĉar tiam vi rajtos vidi la imperiestron dum li manĝas.
- Knabineto** : Ho certe, mi konas ĝin.
- Kortegestro** : Tiam tuj iru al la imp. **(puŝas ŝin antaŭ la imp).**
- Imp.** : Ĉu vi konas la birdon, kiu kantas en la mallumo kaj kiun oni nomas najtingalo?
- Knabineto** : Jes, via moŝto, mi konas ĝin, mi ofte aŭdas ĝin. Jes, kiel belege ĝi kantas! Ĉiuvespere mi portas al mia patrino restaĵojn de manĝaĵoj. Ŝi loĝas malsupre, apud la bordo de la maro. Kiam mi iras returne, mi ofte estas laca, kaj ripozas en la arbaro, kaj tiam mi aŭdas la najtingalon. Tiam larmoj staras en miaj okuloj, kaj estas al mi, kvazaŭ mi kisas la patrinon.
- Imp. (al si mem)** : Mirige, mirige, kaj mi tute ne konis tiun belan birdon, kiu sorĉe forigas la lacecon kaj zorgojn de la homoj...
- Kortegestro (al la knabineto)** : Malgranda kuireja knabineto, ni havigos al vi konstantan oficon en la kuirejo, kaj la permeson vidi, kiel lia moŝto la imperiestro manĝas, se vi povas konduki nin al la najtingalo.
- Knabineto** : Nu, ne estas malfacile. Ĝi ofte kantas en la proksimeco de la palaco. Jam vesperiĝas. Se oni malfermas la fenestrojn ni verŝajne baldaŭ aŭdos ĝin. Se ni nur aŭskultas.
- Imp.** : Mi estas laca, kaj deziras ripozi. Vi nur zorgu, ke la najtingalo ĉivespere kantu en mia palaco. **(eliras).**
- Kortegestro (al lakeoj)** : Malfermu la fenestrojn **(ili faras)**. Ni bone aŭskultu! **(Malantaŭ la scenejo oni aŭdas la blekadon de bovinoj.)**
- 3-a kortegano** : Ha, jen ni ĝin havas! Sidas efektive tute neordinara forto en tia malgranda besteto. Mi certe iam antaŭe aŭdis ĝin.
- Knabineto** : Ne, tio estas bovino, kiu blekas. Estas tro frue por la najtingalo. **(Post momento aŭdiĝas la blekado de ranoj.)**
- 2-a kortegano** : Nun mi ĝin aŭdas. Tio sonas ĝuste kiel malgrandaj sonoriletoj de preĝejo!
- Knabineto** : Ne, tio estas ranoj, en la marĉo. Sed nun mi pensas, ke ni baldaŭ aŭdos la najtingalo. **(Ĉiuj streĉe aŭskultas. Post momento oni aŭdas la kantadon de najtingalo).** Jen ĝi estas! Aŭskultu, aŭskultu! **(Ĉiuj levas fingron).** Kaj jen, tie ĝi sidas. Jen, tiu malgranda griza birdo, supre en la branĉoj.

Kortegestro : Ĉu estas eble? Tia mi neniam prezentis ĝin al mi. Kian simplan eksterajon ĝi havas! Ĝi certe paliĝis, ĉar ĝi vidas tiom da altrangaj personoj antaŭ ŝi!

Knabineto : Najtingalo, nia plej moŝta kaj fervorkora imperiestro deziras, ke vi kantu antaŭ li. **(la najtingalo ekkantas).**

Kortegestro : Tio sonas tute kiel vitraj sonoriletoj. Kaj rigardu do la malgrandan gorĝeton, kiel forte ĝi laboras. Estas tre strange, ke ni neniam ĝin aŭdis. Ĝi havos grandan sukceson en la kortego!

Knabineto : Mia bonega, ĉarma najtingaleto, mi havas la grandan plezuron komuniki al vi la ordonon, ke vi venu hodiaŭvespere al palaca festo, kie vi devas ravi lian imperiestran moŝton per via ĉarma kantado. **(la birdo kantas, oni aŭskultas).**

Knabineto : Ĝi diras, ke ĝia kantado plej bone efikas en la verdaĵo, sed ĉar la imperiestro tion deziras, ĝi venos en la palacon.

Ĉiuj : Ha, kia feliĉo!!

(La kurteno fermiĝas. La fabelvirineto aperas.)

Fabelvirineto : Kaj tiun vesperon estis festo en la palaco. Ĉiuj lampoj brilis. La plej belaj floroj, kiuj povis laŭte tinti per siaj sonoriletoj, staris en la koridoroj. Meze en la salono sidis la imperiestro, kaj multaj korteganoj staris ĉirkaŭ li. Kaj la kuireja knabineto jam ricevis la titolon de efektiva kortega kuiristino. Ĉiuj surhavis siajn festajn vestojn, kaj ĉiuj rigardis la malgrandan birdeton, al kiu la imperiestro faradis aprobajn kapmovojn. **(La fabelvirineto malaperas. La kurteno malfermiĝas. Dume oni aŭdas la kantadon de la najtingalo. Ĉiuj streĉe aŭskultas. De temp' al tempo la reĝo forviŝas larmon. Krom la imperiestro kaj korteganoj estas kelkaj figurantoj sur la scenejo.)**

Ĉiuj : Ho, kiom belege! Rave! Mirinde!

Imp. (al kuireja knabineto, kiu staras ĉe la birdo) : Diru al la najtingalo, ke ĝia kantado tre al mi plaĉas. Mi donas al ĝi la rajton porti oran pantoflon ĉirkaŭ la kolo, kaj ĝi ricevos la titolon de supera kortega kantisto.

Knabineto : Najtingalo, via kantado tre plaĉas al la imp. Lia moŝto donas al vi la rajton porti oran pantoflon ĉirkaŭ la kolo, kaj vi ricevos la titolon de supera kortega kantisto.

(La najtingalo ekkantas.)

Knabineto : Via moŝto komprenu bone, ke la najtingalo ne estas sendanka, sed ĝi ne deziras rekompencan. Ĝi diras, ke ĝi jam ricevis sufiĉan rekompencan. Ĝi vidis larmojn en la okuloj de via moŝto, kaj tio estis por ĝi la plej granda trezoro. La larmoj de imperiestro havas mirindan potencon. Ĝi estas sufiĉe rekompencita.

Imp. : Diru al la najtingalo, ke ĝi ĉiam restu proksime de mi, por ke ĝia kantado feliĉigu min. Kaj unufoje semajne ĝi kantu por la popolo sur la granda placo en la urbo. Ankaŭ mia popolo estu feliĉa!

(La knabino ripetas la vortojn, la kurteno fermiĝas. La fabelvirineto aperas.)

Fabelvirineto : Tiel la najtingalo akiris la favoron de la imperiestro. Oni decidis, ke ĝi restu en la kortego. Ĝi ricevis propran kaĝon, kaj dufoje

tage, kaj unufoje nokte ĝi rajtis promeni en la libera aero. Tiam dekdu servistoj akompanis ĝin kaj ili ĉiuj devis teni ĝin per rubando, kiu estis ligita ĉirkaŭ unu el ĝiaj piedetoj. Certe ne estis granda plezuro en tiaj promenadoj. La tuta urbo nur parolis pri la najtingalo. La sinjorinoj de la kortego prenis akvon en la buŝon, por doni al sia voĉo ploretan nuancon, kiam iu parolos al ili, kaj tiam ili pensis, ke ankaŭ ili estas najtingaloj. Eĉ dekdu infanoj de butikistinoj estis baptitaj per ĝia nomo, kvankam iliaj voĉaj organoj tute ne montris antaŭkapablon por la kantarto...

Tiel la najtingalo vivis en la palaco, ĝis okazis, ke venis dua najtingalo...
(La virineto foriras, la kurteno malfermiĝas. Sur la scenejo estas la imperiestro kun kelkaj korteganoj.)

Lakeo (riverencante antaŭ la imperiestro) : Via moŝto, venis sinjoro, kiu petas permeson transdoni donacon al via moŝto.

Imp. : Vi povas meti la donacon en mian donacejon. Mi poste rigardos ĝin!

Lakeo : Sed via moŝto, laŭ siaj vortoj li estas sendita de lia moŝto la imperiestro de Japanujo, kaj li persone deziras transdoni la donacon.

Imp. : Nu, venigu lin. (Lakeo eliras. Post momente li revenas kun kuriero, kiu portas grandan skatolon).

Kortegestro : Iru al lia moŝto, kaj plenumu vian komision.

Kuriero (prezentante la skatolon) : Via imperiestra moŝto, mi estas sendita de lia moŝto la imperiestro de Japanujo, por transdoni ĉi tiun donacon. Ĉu via moŝto deziras ĝin ricevi?

Imp. : Donu ĝin. En mia nomo vi danku lian moŝton la imperiestron de Japanujo. (al la kortegestro) : Malfermu la pakajon. Certe denove libro pri la najtingalo.

(La kortegestro disvolvas la paperojn. Ĉiuj ĉeestantoj streĉe rigardas. En la pakajo estas malgranda, artefarita najtingalo, riĉe ornamita).

Ĉiuj : Ho belege, rave, mirinde, kurioze!

Kuriero (alproksimiĝas) : Via moŝto permesu, ke mi klarigu la donacon. Ĉi tiu birdo havas la mirindan potencon, ke ĝi povas plene imiti vian vivantan najtingalon. Ĝi ne nur imitas vian birdon, sed ĝi eĉ kantas multe pli bele. Ĝi severe observas la takton, ĉar ĝi kantas laŭ rulcilindroj, do multe pli precize ol via birdo! Se oni streĉtordas ĉi tiun najtingalon, ĝi ravis vin ĉiujn! Ĉu via moŝto permesas?

Imp. : Faru! Ni tre scivolas aŭdi la birdon. (La viro iom okupas sin pri la birdo kaj oni aŭdas pecon de la sama melodio, kiun kantis la vera najtingalo; nur iom malpli laŭte).

Ĉiuj : Mirinde! Belege! Ĝi kantas multe pli bele ol la alia najtingalo. (La kuireja knabineto rapide envenas).

Knabineto : Ĉu nia najtingalo estas malsana? Ĝi kantas malpli bele ol antaŭe!

Kortegestro : Silentu! Vi ne komprenas arton.

Kuriero : La stultulino mokas la donacon de la imperiestro de Japanujo!

Kortegestro : For de tie ĉi! (li puŝas la kuirejan knabineton en angulon de la ĉambro. La artefarita birdo kantas; ĉiuj aŭskultas).

Imp. (al la kuriero) : Mia sinjoro, la birdo kantas efektive belege. Mi donas al vi la titolon de imperiestra ĉefa kortega alportisto de najtingaloj.

Kuriero (riverencante) : Mi tre dankas, via moŝto! Ĉu via moŝto do rimarkis, kiom belege la birdo aspektas? Multe pli bele ol la vivanta najtingalo!

Ĉiuj : Ho, multe pli bele !

Kuriero : Kaj la birdo kantas ĉiam belege, ĉiam belege, ĉar ĝi neniam laciĝas! (Dume la kuireja knabineto nerimarkite venas el sia angulo, prenas kaŝe la vivantan najtingalon kaj foriras kun ĝi. Neniu rimarkas ŝin). Kaj ĉi tiu najtingalo ne bezonas freŝan aeron! Via moŝto spertos multan plezuron per ĝi! (La kantado de la artefarita birdo haltas).

Imp. : Nun la du najtingaloj kantu kune, por ke ni povu kompari la belecon!

Ĉiuj : Jes, nun la du najtingaloj kantu kune (ili frapas la manojn).

Kortegestro : Granda ĉielo! Via moŝto, la najtingalo estas for!

Ĉiuj : Ĝi estas for! La unua najtingalo estas for!

Imp. : Ha, kia sendanka besto! Ĝi perdis mian favoron! Ĝi restu for! Ĝi restu ĉiam for!

Ĉiuj : La reĝo koleras! La birdo restu for!

Imp. : Feliĉe ni ankoraŭ havas la plej bonan!

Ĉiuj : Ni ankoraŭ havas la plej bonan !

Kuriero : Ĉi tiu najtingalo certe neniam forflugos, via moŝto!

Imp. : La belega artefarita najtingalo de nun estos mia supera kortega kantisto. Ĝi havu honoran lokon en la palaco. Ĝi ricevos la titolon de grandimperiestra noktotabla kantisto kun la rango de konsilisto de la unua klaso de la maldekstra flanko. (Al la kuriero) : Kaj vi montru la birdon la proksiman dimanĉon al la popolo. Ankaŭ ili aŭdu ĝian kantadon. (La birdo ekkantas. La kurtenoj fermiĝas. La fabelvirineto aperas).

Fabelvirineto : Tiel la vera najtingalo estis ekzilita el la lando. La artefarita birdo ricevis honoran lokon en la palaco. La imperiestro, la kortego kaj ĉiuj aliaj sciis ĉiun sonon de la kanto de la artefarita najtingalo parkere, kaj ĝuste tial ili alte taksis ĝin! Sed la malriĉaj fiŝkaptistoj, kiuj aŭdis la veran najtingalon, diris : Estas vero, ke la artefarita birdo kantas bele, sed io mankas, io, kion ni nur ne ĝuste povas esprimi. La muzikajisto verkis dudek kvin dikajn librojn pri la artefarita birdo. Tiuj verkoj estis tiel malfacilaj kaj longaj, ke neniu komprenis ilin. Sed ĉiuj homoj diris, ke ili legis kaj komprenis ilin, ĉar alie oni rigardus ilin kiel malsaĝajn. Tiel la aferoj iris dum tuta jaro. Sed iam okazis granda malfeliĉo. Iun tagon, kiam la artefarita birdo kantis, subite aŭdiĝis en ĝia interno stranga sono. Io krevis... ŝurrr! Ĉiuj radoj ekkuris, kaj baldaŭ la muziko silentiĝis... (La kurtenoj malfermiĝas. En la ĉambrego estas la imperiestro kun kelkaj korteganoj).

Imp. : Ho ve, mia supera kantisto silentas. Mi estas senespera! Kia malfeliĉo!

Ĉiuj : Ho ve, kia malfeliĉo!

Imp. (al lakeo) : Voku tuj mian kuraciston! (Lakeo for). Ah, mi kompatindulo. Mia najtingalo ne plu kantas! Nun ĝi ne plu forkantos miajn zorgojn.

Ĉiuj : Ho ve!! (La kuracisto envenas).

Kuracisto (riverencante) : Ĉu via moŝto sentas sin malsana?

Imp. : Ne mi, sed mia artefarita najtingalo!

Kuracisto : Via moŝto pardonu min, sed pri rulcilindroj mi ne havas kom-

prenon. Kia malfeliĉo! Sed via moŝto venigu la horloĝiston! Li certe kuracos la alte ŝatatan superan kantiston!

Imp. (malpacience) : Vi do ne povas helpi min! Stultuloj vi estas, ĉiuj! **(al kuracisto) :** For vi! **(al lakeo) :** Venigu mian horloĝiston, tuj! Ho, kiom malfeliĉa mi estas! **(karesas la artefaritan birdon).** Vi ĉarma birdeto, kantu do, kantu! Mi donis al vi oron kaj juvelojn! Ho, kantu do, kantu! **(La horloĝisto envenas).**

Horloĝisto : Via moŝto venigis min?

Imp. : Horloĝisto, ĉu vi kapablas resanigi mian najtingalon? Ĝi ne plu kantas. Se vi denove kantigos ĝin, atendos vin riĉa rekompenco!

Horloĝisto : Mi klopodos, via moŝto, mi klopodos **(Li prenas la birdon kaj kvazaŭ turnas kelkajn ŝraŭbojn. Post momento la birdo ekkantas).**

Imp. (ĝoje) : Ha, aŭdu **(ĉiuj levas fingron).** Horloĝisto, iru al mia trezorgardisto. Li riĉe rekompencu vin! Ho, mi tre dankas vin, ĉar vi redonis la voĉon al mia karega najtingalo!

Horloĝisto : Momenton, via moŝto. Via moŝto permesu, ke mi atentigu vin pri io. Mi nun sukcesis ripari vian alte ŝatatan superan kantiston, sed ĝi devas esti tre ŝparata. La vipotoj estas eluzitaj, kaj se oni devas enmeti novajn, la muziko ne plu iros kun certeco! Estas granda risiko kantigi ĝin! Ĝi certe ne kantu pli ol unufoje jare.

Imp. : Ah, kia malfeliĉo!

Ĉiuj : Kia malfeliĉo trafis nin! **(La kurtenoj fermiĝas).**

2-a Akto.

Scenejo : La sama ĉambrego kaj meblaro. Flanke nun staras divano, sur kiu kuŝas la malsana imperiestro. Li estas apartigita en la salono per ekranon, tiel ke la publiko vidas kvazaŭ du ĉambrojn : En la malgranda kuŝas la imp. en la granda estas la korteganoj. La imp. kvazaŭ dormas.

Kortegestro : Granda malfeliĉo trafis nian landon! La imperiestro estas tre malsana.

2-a Kortegano : Kaj la arta najtingalo ne plu kantas. Ĝi rompiĝis!

3-a Kortegano : En la lasta tempo ĝi ofte difektiĝis.

Kortegestro : La imperiestro multe suferis pro tio. Li grave malsaniĝis!

2-a kortegano : La kuracistoj diras, ke li ne plu resaniĝos!

Kortegestro : Mi vidis lian vizaĝon. La morto jam sidis sur lia brusto!

3-a kortegano : La tuta lando estos en funebro se la imp. mortos!

Kortegestro : Jes, kaj ni bezonos novan imperiestron en nia lando!

2-a kortegano : Ni trarigardu la familiajn dokumentojn, por vidi, kiu estos nia sekvonta imperiestro! **(Ili silente okupas sin pri dokumentoj).**

Imp. : Fi, maldolĉa estas la morto! Mi apenaŭ povas spiri. Estas, kvazaŭ io sidas sur mia brusto. **(La kuireja knabino nerimarkite envenas la ĉambron de la imp. kaj metas la veran najtingalon sur tableton aŭ fenestrobreton).** Ho, de ĉiuj flankoj alrigardas min kapoj. Kelkaj estas belaj kaj pacoplenaj, sed multaj estas tiom malbelaj! Ho, ĉu mi faris tiom da malbono dum mia vivo? **(la najtingalo ekkantas).** Ho, tion mi neniam sciis. Estas tiom terure al mi! La morto alrigardas min per siaj okulavoj... **(silentas momenton;**

iom post iom lia vizaĝo pli seneriĝas). Fi, maldolĉa estis la morto, sed ŝajnas, ke ĝi foriras de mi! Per kia miraklo revenis la vivo al mi? En ĉiu minuto mi fariĝas pli forta! Ha, mi komprenas, mia bela najtingalo revenis! Mi aŭdas, ĝi venkis la morton! Ho, kiom sendanka mi estis al tiu birdo. Mi ekzilis ĝin el la lando, kaj nun ĝi revenas en mia plej malfacila momento kaj forpelas la morton de mia lito. **(li eksidas)**. Kaj jen mi vidas : kun ĝi revenis la kuireja knabineto. Ho, knabineto, ĉu la najtingalo ne plu koleras? Ĉu ĝi restos ĉe mi?

Knabineto : Imperiestra moŝto, la najtingalo ĉiam restis via amiko. Ĝi nur atendis en la arbaro, ĝis revenis via saĝo, per kiu vi vidos la diferencon inter veraj kaj falsaj amikoj.

Imp. : Tiu momento jam venis. Mi nun scias, ke vera najtingalo multe superas artefaritan! Mi esperas, ke la vera najtingalo nun ĉiam restos ĉe mi!

Knabineto : La najtingalo ĉiam restos ĉe vi, kaj ĝi informos vin pri ĉio, kio okazas en via regno. Ĉar ĝi ne loĝos plu en la palaco, sed en la verda arbaro. Ĉiuvespere ĝi venos al vi por rakonti, kie loĝas viaj veraj amikoj, tio estas la amikoj de la belo kaj bono. Ĝi ankaŭ rakontos kie loĝas tiuj, kiuj suferas, kaj vi helpos ilin !

Imp. : Ĉu la najtingalo povas rakonti pli multe?

Knabineto : Certe, via moŝto, ĝi ankaŭ rakontos, kie troviĝas la friponoj, kiuj malamas la homojn kaj kiuj amas nur sin mem. Tiujn vi ankaŭ ekkonu, por ke okazu al ili justeco.

Imp. : Mi volas aŭdi ĉion de la kara najtingalo, por ke ĉiu en la lando estu feliĉa! Amo kaj justeco regu ĉiel!

Knabineto : Via moŝto, la najtingalo pli amas vian koron ol vian tronon. Aŭskultu, ĝi komencas rakonti. **(La birdo ekkantas)**.

Kortegestro (en la apuda ĉambro). Do, sinjoroj korteganoj, ni trovis novan imperiestron. Nun ni rigardu, ĉu nia imperiestro jam mortis. **(ĉiuj ekstaras)**. Sed... aŭskultu !

Ĉiuj : La najtingalo!!! **(Ili streĉe aŭskultas. Dume la imperiestro ellitiĝas, kaj eniras la apudan ĉambron. La birdo silentas)**.


Ĉiuj : La imperiestro!!!

Imp. : Bonan tagon, sinjoroj korteganoj! Via imperiestro revenis, kaj amo kaj vero ekregu sur tero!!!

FINO.

Peto : Multaj fidelaj legantoj en Hispanio, Germanio, Jugoslavio, kaj aliaj landoj, ne plu povas sendi monon por pagi la kotizon. Bonvolu helpi ilin laŭpove : Sendu por unu aŭ pluraj geamikoj la kotizon. Ni publikos la nomojn kaj adresojn en „La Juna Vivo”. Ne prokrastu, ĉar la afero urĝas !

ENIGMOJ



La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale :

1. malforgeson;
2. malmultfojan.

Oni uzu jenajn literojn : a, a, e, e, e, e, f, m, m, m,
n, n, o, o, o, o, r, r, t, t.

T. Sv. Martin (C.S.R.).

D. Vojo.

Ni akceptos solvojn ĝis 15 oktobro. Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.

La solvo el No 12 :

1-2 : kuko; 2-3 : koko; 3-4 : kolo; 1-3-4 : kukolo.

La premiojn gajnis : S.ro Rodrigues en Montemor-O-Novo (Portugalia) kaj S.ro Lefillastre en Equeurdreville (Francujo).

ANONCETOJ (30 c. ĉiu linio).

KIEL LERNI ESPERANTON ? Unue pristudu la „Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo“. Tre taŭga, belaspekta libreto. Dua eldono. Prezo guld. 0,20. Rabato ĉe grandaj mendoj. **Due** pristudu la 3-an binditan jarkolekton de „La Juna Vivo“. Belaspekta, 180 paĝa libro. Enhavo : daŭrigo je la kurso en la lernolibreto, belegaj rakontoj por progresintoj, simplaj anekdotoj, ŝercoj por komencantoj, kantoj, enigmoj, ktp. Prezo nur guld. 0,35 plus afranko.

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK, A.G.J. v. Straaten. Ampleksa, tolbindita libro, Esp.-Ned.—Ned.-Esp. Klara preso. Prezo nur guld. 2.25. Mendebla al „La Juna Vivo“.

TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO, Jan Welzl. Tre interesa libro, pri la travivaĵoj de simpla Moraviano en la glaciaj regionoj de la Nordo. Prezo : bind. guld. 2,75 (afr.).

BALADO PRI OKULOJ DE HEJTISTO, Wolker. Bela traduko el la moderna ĉeĥa poezio. Bibliografia eldono, du tutpaĝaj lignogravuraĵoj. Prezo : guld. 0,40.

ESPERANTO-KRAJONO : Tre bonkvalita, belaspekta, verda krajono. — Prezo : po 6 c.

KANTARO „LA JUNA VIVO“. Form. 16 × 12 cm. Enhavo : 34 kantoj kun muziknotoj. Tre taŭga por grupkunvenoj. Prezo : po 35 c. 2 ekz. por 50 c.

LA JUNO VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

Por la laborkunsido en Tervuren ni ricevis proponon por ĉi rubriko de Henri Trelluyer. Li ŝatas, ke la rubriko fariĝu pli intima, kaj sekve proponas, ke ni ĉiam direktu nin en ĉi rubriko al propra korespondanto, sub pseŭdonimo. — Bone mi komprenas nian junan amikon. Malgraŭ tio mi havas alian proponon : Bonvolu paroli en ĉi tiu rubriko en la sama amika tono, kiun vi uzas en via hejmo, tiam iom post iom ni formos unu grandan familion, laŭ la deziro de D-ro Zamenhof.

Ĉiu estajo helpas.

Eble vi pensas, ke nur serioza argumentado konvertas ne-esperantistojn. Sed vere, ĉiu aludo pri esperanto en la ĉiutaga vivo faras multan bonon. — Konsideru mian ekzemplon :

Mi legis en ĉiusemajna gazeto mallongan artikolon pri la Esperanto-kongreso en Londono. La ideo de esperanto interesis min, sed la artikolo ne menciis, kiel mi povos kontaktiĝi kun la movado. Tamen ĝi menciis, ke estas Esperanto-Asocioj en ĉiuj landoj. Mi do trarigardis telefonan adresaron, esperante, ke la nomo estos „The British Esperanto-Asociation”. Kaj vere, mi ekvidis la adreson. Mi baldaŭ kontaktis kun la movado, kaj nun, kvankam mi nur havas la aĝon de dek ses jaroj, kaj ankoraŭ neniam vidis Esperantiston, mi lernis la gramatikon de la lingvo. Mi estas ano de T. J. O. kaj B. E. A. kaj abonas tri ĉiumonatajn gazetojn. Kiam ĉi tiu letero aperos en „La Juna Vivo”, mi jam estos vizitinta Tervuren, kaj havos multajn amikojn esperantistajn.

Abingdon (Anglio).

W. M. Kennedy.

Jen letero, kiun ni ricevis, kaŭze de sciigo en la ekzercio : „Esperanto-leteroj” :

Estimata redakcio. — Mi petas vin publikigi la suban sciigon, por ke la tuta esperantista junularo sciu, ke la ĉefaj geamikoj ne „mortis”.

En la lasta numero de via gazeto (No 1 1939) diris la aŭtoro de „Esperanto-leteroj”, ke en kelkaj landoj Esperanto „mortis”. Mi estas ĉeĥo, kaj mi dankas la redakcion, ke ĝi ne kredis tiun malveran aserton, kaj aldonis signon de demando. Jen legu mian sciigon : „En Ĉeĥio kaj Moravio estas esperantistoj, aktivaj kiel antaŭe. Kaj nia Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio ankaŭ funkcias.

Kompreneble la nombro malgrandiĝis, sed ĉiam ankoraŭ estas multe da bonaj, aktivaj ĉefaj kaj moravaj samideanoj!

Mi ankaŭ afable petas vin, publikigi mian adreson. Mi estas 16-jara junulo, kiu deziras korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo, precipe kun la verkint(in)o de „Esperanto-leteroj”, por ke mi informu lin(ŝin) pri la esperantista vivo en Ĉeĥio kaj Moravio.

Kun samideanaj salutoj, Via Oldrich Simon, Lysà n/Laben, Velachova 1183, Ĉeĥio kaj Moravio (Ĉeĥoslovakujo).

Ni ankoraŭ ricevis tri leterojn de germanaj amikoj kontraŭ la sama frazo en la simpla ekzerco. Mi multe ĝojas pri tiom da protesto. Montriĝas, ke jam multaj junaj homoj estas maturaj por la idealo de D-ro Zamenhof. Espereble baldaŭ ankaŭ la plenaĝuloj plene komprenos ĝin.

Ni havu respekton kaj komprenon por ĉies pensmaniero !

Pensetoj de simplulo.

La spertoj de la pasinteco estu nia forto, kiam la cirkonstancoj igas nin malesperi. Eĉ se la situacio aspektas tute katastrofa, ni konservu en la brustoj la eternan esperon pri printempaj tagoj, kiam la sunradioj de amo, frateco kaj justeco neniigos la glaciajn tavolojn de bruteco, malestimo kaj perforto.

Civilizio kaj kulturo bezonas nuntempe ĉiujn bonajn fortojn. Kaj ĝuste en maltrankvilaj tagoj la sindonemo kaj sincereco de la kredo estas tre bezonataj.

Svedio.

Ede.

Nordhausen, 6-8-1939.

Multege ĉagrenas al mi, ke mi antaŭ unu semajno ricevis la sciigon, ke mi ne povos havi la feriojn dum la junularkunveno. Poste mi multe disputis, kaj amiko volis transpreni mian deĵoron, sed ne helpis, kaj mi ne povos veni. Mi havas profundan doloron.

Werner Brade.

„...Ĉu estas vere tiel malfacile esti homo? Ĉiu homo sur la mondo, tutegale ĉu li estas germano, anglo, judo, negro, ĉino aŭ japano, sentas la samon, kiam li estas malsata, ĝojas, kiam oni bone traktas lin. Ne per malamo, sed nur per amo ni povas plibonigi la mondon. Se ni helpas la aliajn, ni helpas al ni mem, ĉar ĉiu faro portas la meritajn fruktojn.”

Aŭstro.

Adalbert Schwingshagl.

Ni ricevis leteron de nia juna hispana amiko Justo Estan. Ankoraŭ li estas en malliberejo en Valencio. Espereble li baldaŭ estos libera, kaj fariĝos bona propagandisto por la vere Zamenhofa idealo : Interfratigi ĉiujn homojn en unu granda familio.

Jen la premiita verkaĵo en la nederlanda konkurso por Tervuren:

Kiel mi lernis Esperanton.

Kiamaniere mi iĝis esperantisto estas interesa historio kaj tial mi pensis, ke mi tion rakontos por la konkurso.

Mi ankoraŭ ne estas tre granda knabo, ĉar mi havas nur 10 jarojn, sed mi jam bone parolas esperanton. Mia patro jam delonge kapablas esperanton, kaj li ankaŭ korespondis multe. Kiam mi havis 7 jarojn, paĉjo ekkomencis min instrui pri esperanto. En la komenco tio ne bone sukcesis. Nur kelkaj frazoj restis en mia cerbo, ekzemple pri la alportado de liaj ŝuoj, kaj tiel plu. Multfoje mi demandis al li : „Paĉjo, kial mi jam nun devas lerni la esperanto-lingvon ? Kiam mi estos granda, tiam mi ankaŭ eklernos.”

Paĉjo kelkfoje vojaĝis eksterlanden, kaj iam, kiam li revenis el Ĉeĥo-Slovakujo, li diris al mi : „Nu, knabo, nun vi certe devos lerni esperanton, ĉar post kelkaj monatoj mi edziĝos kun fraŭlino, kiu tute ne kapablas paroli la nederlandan lingvon.”

Mi ankoraŭ ne bone komprenis, kion tio signifis. Paĉjo poste denove klopodis min instrui, sed denove vane. Mi forgesis ankaŭ tion, kion mia patro multfoje instruis al mi, kaj kion mi nur mal-facile lernis. La pasintan jaron en januaro alvenis la nova patrino, kun kiu mi tute ne povis paroli, ĉar ŝi ne komprenis holandan vorton. Vane mi diris ion al ŝi. Ŝi nur rigardis min, kaj demandis : „Kio estas tio? Mi ne komprenas vin.”

Multfoje mi devis peti mian patron por traduki, sed se li ne estis hejme, tiam mi devis iel kun panjo paroli. Kaj tion mi tiel faris : Mi havas hejme legolibrojn holandajn, en kiuj estas multaj bildoj. Mi montris unu bildon kaj diris la nomon holande, kaj panjo esperante. Kaj tiel estis kun ĉio. Tio ja ne estis facila, sed post kelkaj semajnoj ni jam tre bone povis kompreni unu la alian. Kaj tiam mi ĉiam pli parolis esperante. Se ni biciklis al la urbo, aŭ kiam ni estis duope hejme, ni ĉiam parolis kaj kion mi ne povis diri esperante, tion mi diris holande kaj ankaŭ nun mi tiel faras. Kun mia patro mi ĉiam pli bone povis paroli holande aŭ frize, sed nun mi jam multfoje parolas ankaŭ kun li esperante. Sed mi devas ankoraŭ multe lerni, tion mi scias. Mi tre volonte legas „La Juna Vivo”n kaj ankaŭ aliajn esperanto-librojn, ĉar mi tre ŝatas la rakontojn. Mi ankaŭ instruis al du amikoj esperanton, sed ili kapablas nur kalkuli kaj ne paroli.

Mi vojaĝos ankaŭ al Tervuren dum la somero kaj pro tio mi

estas gaja, ĉar tiam mi povos paroli ankaŭ kun aliaj infanoj, kiujn mi alie ne komprenus, nek ili min. Mi tre ĝojas, ke mi povas paroli esperanton, kaj mi ankaŭ petis esperanto-flagon por mia biciklo, por ke ĉiuj vidu, ke mi estas esperantisto. Mi tre ŝatas paroli esperanton, kaj mi volonte volus, ke ĉiuj infanoj en la tuta mondo parolus tiun lingvon. Mi ŝatus, ke ankaŭ en la lernejo oni povu paroli kaj lerni esperanton. Ankaŭ mi ege ĝojus, se mi povus gajni la premion de „La Juna Vivo”. Ĉu tio povas ?

Wirdum (Ned.).

Klaas Burgler (10 jara).

LA PREMIO-KONKURSO EN ANGLUJO.

Por nia premio-konkurso ni ricevis entute 20 verkaĵojn, el ĉiuj partoj de la lando. — La unuan premion (senpagan viziton al la kunveno en Ter-vuren) ricevis F.ino Mary Hoskins, el Seven Sisters, Neath. S-ro William Kennedy, el Radley College, Berks., ricevis la duan premion : senpagan vojaĝon al la kunveno. La trian premion (jarkotizon al T.J.O.) oni aljuĝis al S-ro Douglas Bills, el Crayford, Kent, kaj por la kvara premio tri junuloj ricevis la saman nombron da poentoj. do ili ĉiuj ricevis hinditan jarkolekton de „La Juna Vivo”. Ili estis : F.ino Barbara Bartlett, el Seven Sisters, F.ino Lilian Davies, ankaŭ el Seven Sisters, kaj S-ro Hubert Beaumont, el Fartown, Huddersfield. — Al ĉiuj aliaj verkintoj ni sendis T.J.O.-paketon, kiel rekompencon por iliaj intereso kaj laboro en la konkurso.

John W. Holland.

Jen la verkaĵo de Mary Hoskins (Kimrujo), 15 jara, kiu gajnis la unuan premion :

Mia lando Kimrujo.

Kimrujo estas belega lando. Estas la lando de la montoj kaj riveretoj. Cardiff estas la plej granda urbo.

Oni diras, ke Kimrujo ankaŭ estas la „Lando de Kantado”. La homoj de Kimrujo ŝatas kantadon, kaj ili kantas belege. Vi ĉiam estas bonvenaj en Kimrujo, ĉar la homoj estas tre gastamaj.

La plej alta monto en Kimrujo estas „Snowdon”. Multe da personoj grim-pas ĉi tiun monton. Simile al aliaj landoj Kimrujo havas malnovajn kutimojn. En Marto ni festas nian Sanktulon Davidon.

Kimrujo ankaŭ estas la lando de la minejoj. La ministoj, kiuj ĉiutage estas en danĝero, havas multan kuraĝon. Tiuj, kiuj ne vizitis Kimrujon, ne povas kompreni ĝian belecon.

Ĉiujare la infanoj de Kimrujo sendas pacan sendaĵon al la infanoj de la tuta mondo. La unua sendaĵo estis en majo 1921, kaj la nuna sendaĵo diras, ke : „La mondo estas plena de sufero, kverelo kaj batalo. Oni diras al ni, ke la civilizacio eble pereos. Ni diru al la mondo, ke la civilizacio ne pereos. La mondo bezonas tion, kion nur ni povas doni : fidon kaj kamaradecon. Tiel ni, la tutmonda junularo, iĝos la amikoj de ĉiuj kaj la malamikoj de neniu.”

Por komencantoj.

Malklaraj trafik-tabuloj.

Je la oka kaj duona horo komenciĝas la lernejo. Je la naŭa kaj duona alvenas Petro.

„Knabo, de kie vi venis?” demandas la instruisto.

„Mi estis survoje al la lernejo, sinjoro” respondas Peĉjo.

„Sed vi estas tro malfrua!” diras la instruisto. „Kion vi faris dumvoje?”

„Nenion, sinjoro” respondas Peĉjo. „Mi iris je la oka el mia domo, sed mi sekvis alian vojon, kaj flanke de la strato staris tabulo, kun la vortoj : „Lernejo, malrapide!” Kaj tion mi faris.”

Wemeldinge (Nederl.).

Jannie Bliëk (12-jara).

Komprenebla ruzeco.

La fama verkisto Conan Doyle, kiu verkis la **konatajn rakontojn** pri Sherlock Holmes, iam sidis en vagonaro. Kontraŭ li sidis malgranda, sufiĉe memfida vireto. Subite la vireto diris : „Ha, S.ro Doyle, mi tre ĝojas interkonatiĝi kun famulo kia vi!”

„Sed, sinjoro, kiel vi do konas min?” demandis Coyle mirege.

„Tion mi rakontos al vi! Mi ja estas same ruza kiel via Sherlock Holmes. Aŭskultu : Mi tuj vidis, ke via kolumo ĉifoniĝis. Tio pruvas, ke amaso da ĵurnalistoj tenis vin, kiam vi volis eniri la vagonaron. Viaj haroj altiĝis pro kolero pri la altrudemaj homoj, kiuj petis vian subskribon. Via ĉapelo fuŝiĝis, ĉar ĝin vi tenis en la manoj dum la eniro. Vi ankaŭ fumis, ĉar kuŝas ankoraŭ iom da cindro sur via pantalono. Vi ne havis tempon por aĉeti gazeton en la stacidomo, ĉar alie vi nun legus ĝin. Kaj fine — grandlitere staras sur via kofro „Conan Doyle”.

La fama verkisto kore ridis, kaj prezentis al la komikulo plenan eldonon de siaj verkoj. Li devis konfesi, ke li ne estis tiel ruza, kiel Sherlock Holmes.

Respondu al jenaj demandoj :

Ĉu Conan Doyle estis pentristo? Kion li verkis? Kiel li foje vojaĝis? Kion kunportis Conan Doyle? Kio okazis en la vagonaro? Kiel aspektis la homo kontraŭ Conan Doyle? Kion rakontis la vireto? Ĉu la fama verkisto koleras? Kion li faris?

Atentu :

Ĉiam denove ni ricevis mendojn por binditaj jarkolektoj de la lastaj jaroj. Tiuj **ne ekzistas**. Ni nur havas binditajn jarkolektojn de la unuaj tri jaroj (julio 1934-julio 1937). Oni bone notu tion !

Tre simplaj ekzercoj por tiuj, kiuj nur mallonge studis esperanton.

Matene.

La patrino vekas la infanojn. Ili saltas el la lito. La patrino prenas spongon kaj lavas ilin. La infanoj ne ŝatas la lavadon. Ili surmetas la vestojn kaj eksidas ĉe la tablo. La buterpanoj estas pretaj. La infanoj manĝas la buterpanojn. Poste ili iras al la lernejo. Tie ili skribas lecionojn, faras kalkulojn kaj desegnojn, kantas kaj ludas. Je la dekdua horo ili ree iras al la patrino. Ŝi faris la laboron en la hejmo kaj preparis varman manĝaĵon por la familio.

Kiu vekas la infanojn? Kie dormas la infanoj? Kion faras la patrino matene? Per kio lavas la patrino la infanojn? Ĉu la infanoj ŝatas la lavadon? Kion ili faras post la lavado? Kion ili manĝas? Kien la infanoj iras? Ĉu ankaŭ la patrino iras al la lernejo? Kion ŝi faras? Kion faras la infanoj en la lernejo? Ĉu ili ankaŭ ludas? Kiam ili ree iras al la patrino?

Mia ferio.

En mia ferio mi iris al Tervuren. Ĉar en Tervuren (en Belgio) estis de 7-14 aŭgusto internacia junular-kunveno. El Nederlando ni iris tien per 3 grandaj aŭtobusoj. Ankaŭ iris multaj bicikle. Mi kredas, ke venis 400 homoj al la kunveno, el multaj landoj. Mi multe ĝuis en la kunveno, ĉar ni ĉiuj estis gajaj. Ni multe promenis, en la belegaj parkoj kaj arbaroj. Ni ankaŭ devis labori, lavi telerojn, kaj kalikojn, sed tio ne gravis. Ĉiu laboro estis agrabla. Mi trovis en Tervuren multajn amikojn. Kun ili mi korespondos dum la vintro. Kaj mi bone studos esperanton, ĉar la gepatroj promesis, ke mi la venontan jaron denove rajtos iri al la Int. junularkunveno. Mi jam nun komencis ŝpari!

10-jara nederlandano.

Kien mi iris en la ferio? Kiam okazis la kunveno en Tervuren? Kiel mi iris tien? Kiom da homoj ĉeestis la kunvenon? Ĉu ni multe promenis? Kiun laboron ni devis fari? Kion mi trovis en Tervuren?

Lasta admono.

La adm. afable petas ĉiujn abonantojn, kies abono finiĝis je 1 julio, kiom eble plej baldaŭ pagi la kotizon por la nova jaro. Al la nederlandaj abonantoj ni prezentos kvitancojn post 15 septembro. La abonantoj ekster Nederlando atentu la liston de perantoj je paĝo 36.

Kion diras la partoprenintoj pri la T.J.O.-kunveno en Tervuren en kiu ĉiutage ĉeestis pli ol 400 geesperantistoj.

Wier (Ned.), 26-8-1939.

Estis pluraj Esperanto-kongresoj kaj kunvenoj dum la jaro 1939, kaj unu el ili estas la Internacia Junular-kunveno en Tervuren. Certe ĝi ne estas la plej malmulte sukcesinta, ĉar eĉ ne unu opiniis la semajnon tro longa, kontraŭe, multaj deziris, ke la kunveno, daŭru du aŭ pli da semajnoj. Tio ankaŭ estas la opinio de la subskribintoj, kaj per tiu ĉi mallonga skribaĵo ili volas danki ĉiun, kiu helpis tiel bone sukcesigi la kunvenon. La venontan jaron ili esperas denove renkonti la Esperanto-geamikojn, kaj ili finas per la vortoj : « Vivu Esperanto! ».

La Frizoj.

Impresoj pri la T.J.O.-kunveno.

Tervuren — belega loko, grandaj parkoj, belaj lagetoj kaj ĝardenoj, interesa muzeo, pin-arbarego, kie oni povas vagadi laŭplaĉe.

Al ĉi tiu riĉenhava loko venis preskaŭ 400 gejunuloj el diversaj landoj, por partopreni la T.J.O.-kunvenon.

Mi mem intencis ĉeesti la kunvenon nur kiel rigardanto, sed tre baldaŭ mi sentis min parto de granda, feliĉa familio. Dum la semajno forte kreskis en mi la sento, ke tie ĉi, inter tiuj bonhumoraj gejunuloj oni povas trovi la fundamentajn principojn de harmonio, feliĉo, kompreno, amikeco kaj frateco. Forte impresis min la facileco de interkompreno pere de nia mirinda lingvo. Multe mi ĝojis, sidante ĉe la manĝotablo, rigardante la multajn ridetantajn vizaĝojn de la gejunuloj dum ili forte babiladis unu kun la alia. Jes, certe estas, ke kelkaj perdis la koron dum tiu ĝojoplena kunveno, kaj multaj aliaj trovis novajn amikojn.

For estis la kriza mondo — ekestis nova mondo, kie regis harmonio, amikeco, frateco, kie ĉiuj estis egalaj kaj liberaj, kie la estraro neniam trudis sin, sed nur helpis, kie ĉiuj manĝis la samajn, simplajn manĝojn.

Jes, kvankam mi devas konfesi, ke mi trovis kelkajn malagrablajojn, kiujn oni povos eviti en venontaj kunvenoj, mi povas konstati, ke la bona spirito kaj harmonio de la kunveno forte kreskis.

Ne estas eble detale skribi ĉion, kio okazis. Sufiĉas diri, ke ni ĉion ĝuis. Speciale la promenadojn tra parkoj kaj arbaroj, la viziton al Bruselo, la longan, interesan vojaĝon tra Belgujo, la interesajn naciajn dancojn de la nederlandaj infanoj, la spertajn gimnastik-dancojn kaj dolĉajn kantojn de la infanoj el Kimrujo, ktp.

Neniam mi forgesos la ĉiam bonhumoran s.ron Noë, kiu tiel forte kaj kviete laboregis por ni dum la tuta semajno. Ni ŝuldas al li, kaj al aliaj belgaj amikoj multajn dankojn.

Tro baldaŭ venis la kor-ŝiriga momento de foriro. Kun larmoj en la okuloj la gejunuloj adiaŭis unu la alian. Dolĉ-maldolĉa momento por ĉiuj.

Iomete ŝanĝante la vortojn de „La Espero”, mi povas sumigi la kunvenon jene :

„Komprenante unu la alian,
La junuloj faris en kunsento
Unu grand' feliĉan familion.”

Ruislip (Angl.).

L. Simes.

Kimraj knabinoj :

„La semajno en Tervuren estis ĝinda. La malfacilaĵoj jam forflugis, kaj restas nur feliĉaj memoroj de bela renkontiĝo. — „Birmingham” estis bela, „Groet” estis pli bela, sed „Tervuren” estis eĉ pli bela ankoraŭ!”

Besançon, la 28an de Aŭgusto 1939.

Kara Amikino,

Vi ŝatas koni miajn impresojn rilate al nia kunveno. Kun plej granda plezuro mi donos ilin al vi. Mi konservos pri mia restado en Tervuren neforgeseblan rememoron. Estis la unua fojo, kiam mi kontaktis kun fremdlandaj esperantistoj. Ĉe mia alveno mi nur sciis tre malmulte en Esperanto; mi neniam parolis ĝin aŭ preskaŭ neniam, sole iom kun gekamaradoj; kaj je la fino de mia restado, mi estis farinta tion da progresoj, ke mi facile povis esprimi min en nia lingvo.

Ofte eĉ okazis al mi, parolante kun aliaj esperantistoj, ke mi konversaciis kun ili tre nature, sen ke mi havis la impreson traduki mian penson en Esperanton! Do, kiel mi ne estus ravita pri nia kunveno! Cetere, ni sentis nin ĉiujn inspiritaj de la sama idealo. Ĉiaj divergencoj pri nacio, rango, relegio, opinio ne ekzistis inter ni, kaj ĝis la lasta tago mi vivis fore de ĉiuj ajn politikaj okupiĝoj kaj zorgoj, kiuj en tiu momento turmentis la franĉojn.

Mi ne parolos pri la organizo kaj materialaj cirkonstancoj de l' restado, kiujn ni opiniis bonegaj, kaj kiuj ege kontribuis al la kreskado de l' sincera kamaradeco, kiu regis inter ni kaj kiu unuigis junulojn kaj plenkreskulojn en harmonia konkordo.

Tial mi esperas je pli bona estonto kaj tial mi volas kredi en estonta konkordo inter la popoloj; kvankam artefaritaj kaj nekompreneblaj malpacoj kontraŭas al ili. Ĉar vere ne estas ebla, ke ni vivas eterne disigitaj. Esperanto tre efike povas kontribui al ĉi tiu repacigo kaj mi konsideras ke estas la devo de ĉiuj esperantistoj senlace labori por ĝi per ĉiaj rimedoj. Rilate al mi, mi pretas kunlabori kiom eble plej bone kun ĉiu ajn, precipe kun vi.

Akceptu miajn korajn salutojn.

Lodeviko Buter' (Louis Bouter),

55, rue de Dole, Besançon (Doubs), Francujo.

Je la 22a de julio 1939a naskiĝis

filino de **MANJO**

H. L. HARTOG kaj

B. HARTOG-GERFEN

Kathammerstr. 68

Volendam (Nederl.)


La 24an de aŭgusto
geedziĝis

M. STOKVIS kaj

CARLA FRANSEN

Adreso :

Bilderdijklaan 36, Hilversum.



komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝiro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Ĝiro 310334.

Por Anglujo : J. W. Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard, Beds.

Red. „La Peranto” kaj „De Esperantist” : Meent 35, Leerdam, Ned.

Jarkunveno : La 12-an de aŭgusto okazis en Tervuren la oficiala jarkunveno de T. J. O., prezidata de S.ro P. Krijt. Post la malfermo, en kiu la prezidanto memorigis la grandan kreskon de la organizo en tiel mallonga tempo, la diversaj raportoj estis aprobataj. Je la pritraktado de la propagando montriĝis ke jam en diversaj landoj oni antaŭpreparas la eldonon de nacilingva propagandgazeto, simila al „De Esperantist”. Ĉiuj estraranoj estis reelektataj; krome aliĝis al la estraro S.ro Kars, kiel prizorganto de la gazetarservo. La rilato al aliaj organizoj montriĝis bonega; tamen oni decidis ne fari kontrakton kun kiu ligo ajn. T. J. O. pretas kunlabori kun ĉiu organizo, kiu celas la bonon de la movado, sed ĝi volas resti sendependa. — Propono por plialtigo de la kotizo de membro-subtenantoj oni provizore prokrastis. — Oni decidis okazigi la venontan junularkunvenon 1940 se eble en Nord-Francio.

Pro spacomanko ni ne povas enpresigi detalan raporton de la jarkunveno. Ĝi aperos en la venonta numero de „La Peranto”. Geperantoj rivecos ĝin senpage, cetere ĝi estas havebla po 5 ned. cendoj.

Semajnfino : La semajnfino, kiun ni aranĝis la 15-an—16-an de julio en Reeuwijk (Ned.) brile sukcesis. Partoprenis 80 personoj. La ĉeestantoj ege ŝatis la programon, kiu enhavis teatraĵojn de la infangrupo el Gouda, muzikadon de la krontjongklubo „Tahiti”, paroladon de S.ro Kars, komunan kantadon, ktp. La sabatvespero finiĝis per kampfajro kaj belega nokta promenado. Dimanĉe oni naĝis, ludis kaj boatveturis. Pro la granda sukceso de ĉi tiu semajnfino ni decidis okazigi similan kunvenon en la sama loko, je la 26-a kaj 27-a de aŭgusto.

Geperantoj, sekvu ĉi tiun ekzemplon! Aranĝu similajn kunvenojn, kaj konigu nian organizon en via regiono.

F. M.

Filmservo : La nova filmo pri Tervuren estos luebla post 20 septembro. La 20-an de septembro ĝi estos prezentata en Middelburg. La luprezo estas 2 gld. La daŭro de la prezentado estas 45 minutoj (3 bobenoj).

Ankaŭ la Groet-filmo restos luebla (2 bobenoj). Ĝi estas tre taŭga por fondi novajn kursojn! La luprezo de la Groet-filmo nun estas 1 gld. plus afranko. La sendkostoj de la filmo sumiĝas 20 cendojn.

Adreso Filmservo : S.ro H. J. Schut, Instruisto, Koedijk (Ned.). Ĝironumero : 310334.

Kolportadgazetoj en ĉiuj landoj : Por propagandi la idealon de D-ro Zamenhof inter ne-esperantistoj estas nepre necesa la eldonado de kolportad-gazetoj en ĉiuj landoj. Prefere oni enpresigu en tiuj gazetoj : 1. Tre simplan esp.-metodon. 2. Unu el la ĉefrakontoj, kiuj aperis en „La Juna Vivo”. 3. Sciigojn pri kunvenoj kaj progresoj en nia juna movado. 4. Rubrikon same kiel en „L. J. V.”, en kiu la junularo rakontas pri siaj ideoj kaj pensoj. 5. Se eble artikoleon de la redaktoro pri nia idealo. Tamen estu prudenta, kaj uzu ĉiam tre simplajn vortojn, kiujn ĉiuj homoj povas kompreni, kaj kiuj ne kaŭzas miskomprenon. Ekzemple: amo, egaleco, justeco, fraŭco, unueco, ktp.

Insigno : Baldaŭ ĉiu T.J.O.-ano (ankaŭ ne-esperantistoj!) portu nian insignon : terglobo kun stelo, kiu estas inda simbolo de la Zamenhova idealo.

Donacoj : F.ino E. en Bishop Auckland (Angl.) : guld. 1.55; F.ino R. en Seven Sisters (Kimrujo) : guld. 0,27.

S.ro H. D., Cum Hardy, Anglio : guld. 2,50; v. d. E. en Santpoort, Ned. : guld. 0,70; S.ro E. en Amsterdamo : guld. 1,50.

REZULTADO DE LA LOTUMADO INTER FRUPAGINTOJ.

F.ino G. Ruardi (Sneek, Ned.) : bind. jark. „L. J. V.” 35/36; F.ino Hooper (Seven Sisters, Kimrujo) : „L. J. V.”-kantaro; F.ino Hughes (Seven Sisters, Kimrujo) : kantaro „La Najtingalo”; S.ro J. Taylor (Londono, Anglujo) : „L. J. V.”-kantaro; S.ro R. Burt (Dagenham, Angl.) : Ludo „Flirto Esperanta”; F.ino A. Kool (W. Grafdijk, Ned.) : „Colomba”; S.ro A. Pascha (Bergen, Ned.) : „Krestomatio”; F.ino Jeanne Dedieu (Prades, Franc.) : „Ellernu”; F.ino P. Grizey (Grouzet-Migette, Franc.) : Bind. jark. „L. J. V.” 36/37; F.ino Nay Bec, Franc.) : „Vartetoj” : Jannie Bliet (Wemeldinge, Ned.) : „L. J. V.”-kantaro; S.ro J. Visser (Franeker, Ned.) : „Lingvaj Respondoj”; Ges.roj Bloeming (Middelie, Ned.) : „L. J. V.”-lernolibreto; Ges.roj Bankersen (Koogerpolder, Ned.) : „L. J. V.”-lernolibreto; S.ino Bas (O. Grafdijk, Ned.) : „Kudlago”; S.ro Jb. v. d. Oord (Burgerbrug, Ned.) : bind. jar. „L. J. V.” 34/35.

Aljustrel, 10-8-1939.

En la nomo de ĉiuj aljustrelaj T.J.O.-anoj mi salutas vin, kaj ĉiujn partoprenantojn en la nuna junularkunveno, dezirante, ke la plej bona interkompreno kaj harmonio regu super vi ĉiuj.

Portugalujo.

Santos Jr.

(Estas unu el la dekoj da salutleteroj, kiujn ni ricevis, precipe de la junaj geamikoj. Koran dankon. En 1940 vi estu inter ni !)



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Anglujo : S.ro Stanley Cann, 17-j. oficisto, dez. kor. k. interŝ. pm. k. geamikoj en ĉ. l. 16, Cinchor Rd, Kingswood, Bristol. Certe resp.

Cehoslovakujo : 16-j. junululo dez. kor. kun gejunuloj el la tuta mondo, por ke li informu pri la esp. vivo en Ĉeĥio kaj Moravio. Oldrich Simon, Lysá n/Laben, Velachova 1183.

Francujo : S.ro Duquenne, 190, rue de Douai, Sin-le-Noble (Nord), dez. kor. kaj interŝ. pm. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Resp. certa.

Nederlando : F.ino dez. kor. kaj interŝ. pm. kun Belgujo, Anglujo, Danujo, Svedujo kaj Norvegujo. M. Plaggemars, A. v. Bergenstr. 1¹¹, Amsterdam.

Nederlando : S.ro J. Vos Jr. (32-jara), Zoomstr. 32a, Rotterdam-N., dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

Portugalujo : Juna F.ino dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉiuj landoj. F.ino M. P. Duarte, str. da Misericordia 37, Ponta Delgada, Açores.

Estonio : 14-jara knabino dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉiuj landoj. F.ino Laine Kurss, Paatsalu p.-ag Oeküla.

Latvujo : Laboristo dez. kor. per leteroj kaj poŝtkartoj. Respondo certa. T. Krastinš, Rembates Bomos, C. Lielvārdi. (Adr. valida ĝis okt.).

PERANTOJ „LA JUNA VIVO”.

BELGUJO : H. Rainson, Hombeeksche stw., 54, Mechelen. Ĝironumero 335183.

BRITUJO : Brita Esp. Asocio, 140, Holland Park Av., London W II.

ĈEĤOSLOVAKUJO : Esperanto-Asocio, Truhlaska 16, Praha II. Poŝtĉek-konto 12.371.

DANUJO : Dana Esp. Instituto (abonejo), Musikhuset, Nyköbing, F.

ESTONIO : Esperanto Asocio de Estonio, Tallin. Poŝtkast 6.

FRANCUJO : F.ino J. Lepachelet, 13 Place Victor Hugo, Somain (Nord). Ĝironumero : Lille 72.36.

HUNGARUJO : Hung. Skolta Rondo, Nagy Sandor U-6, Budapest V.

JUGOSLAVUJO : P. Golobić, Kr. ban. ups. IV, Ljubljana.

LATVUJO : F.ino Ludm. Jevsejeva, Riga, Reformatoru 14/5.

MAROKO : S.ino Fink, 5 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca.

NOVEGUJO : Norv. Esp. Ligo, Skappelsgate 5, Hamar.

POLUJO : Prof. Sygnarski, Kordeckiego 23, Budgoszez.

SVEDUJO : Sveda Lab. Esp. Asocio, Stokholm.

SVEDUJO : Sveda Eladona Societo Esp., Box 698, Stokholm I.

SVISUJO : S.ro R. A. Dasen, St. Jean 17, Geneve.

USONO : Amerika Esp. Instituto, 1111 Brooke Road, Illinois.